

# Esperanto 269 aktuell



40. Jahr (2021) №5 (269)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



La urbo Osterode am Harz, en kiu okazos fine de oktobro 2021 GEA-Semajnfino.

Informationstafel über den Großen Knollen jetzt auch in Esperanto. Rakonto pri vojaĝo tra la tempo. Jarfina renkontiĝo Luminesk' ĉi-jare en Münster. Unuiĝintoj por paco. EU-Zukunfts-konferenz 2021-22. KREO zitiert auf Esperanto. Pri la travivludo „Vintage Story“. Haushaltsplan der DEJ für 2022. 28. KEKSO in Schwerte. Kalendaro.

## Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B  
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

**Bankkonto** (por membrokotoj kaj donacoj) /

**Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEFIERB, Sparkasse Odenwaldkreis, DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

**Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden**  
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: **Sibylle Bauer**  
030 / 5106 2935, 0800 336 3636  
Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de

**Membropriorgado / Mitgliederbetreuung**

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

## Estraro GEA / Vorstand DEB

**Netzpost** an / retmesaĝo al [gea.fe@esperanto.de](mailto:gea.fe@esperanto.de)  
Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form  
[vorname.name@esperanto.de](mailto:vorname.name@esperanto.de).

**Prezidanto / Vorsitzender**

**Ulrich Brandenburg**, Durchwahl: -5111  
[gea.prezidanto@esperanto.de](mailto:gea.prezidanto@esperanto.de)

**Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender**

**Andreas Emmerich**, Durchwahl: -5112

**Trezoristo / Kassenwart**

**D-ro Matthias Hecking**, Durchwahl: -5113

**Sekretario / Schriftführer**

**Nils Brinkmann**, Durchwahl: -5125

**Landaj ligoj / Landesverbände**

**Wolfgang Bohr**, Durchwahl: -5114

**Administrado / Verwaltung**

**Barbara Brandenburg**

**Publika agado kaj pliklerigado /**

**Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung**

**Oliver Walz**, Durchwahl: -5116

**Kongresoj kaj renkontiĝoj /**

**Kongresse und Treffen**

**Andreas Diemel**, Durchwahl: -5120

**Informteknologioj / Informationstechnologie**

**Franz Kruse**, Durchwahl: -5119

**Jugendvertreter / GEJ-komisiito**

**Michael Vrazitulis**, Durchwahl: -5118

**Germana Esperanto-Junularo /**

**Deutsche Esperanto-Jugend**

**Michael Vrazitulis**, Durchwahl: -5211

[michael.vrazitulis@esperanto.de](mailto:michael.vrazitulis@esperanto.de)

## Komisiitoj / Beauftragte

[esperanto.de/deb/beauftragte](mailto:esperanto.de/deb/beauftragte)

**Gazetaraj kaj publikaj aferoj**

**/ Presse und Öffentlichkeitsarbeit**

**Louis von Wunsch-Rolshoven**,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

[louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de](mailto:louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de)

**Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter**

**für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick**, *gea*,

[zoom@esperanto.de](mailto:zoom@esperanto.de), tel. 0800-3363636-5128

**Komisiito por rondvojaĝoj / Rundreisen**,

Durchwahl: -5123

**Uli Ender**, [uli.ender@esperanto.de](mailto:uli.ender@esperanto.de)

**Informmaterialo / Informationsmaterial**

Goar Engländer, Durchwahl: -5127

[goar.engelaender@esperanto.de](mailto:goar.engelaender@esperanto.de)

**Medienecho**

**Hermann Kroppenber**, Durchwahl: -5121

[medienecho@esperanto.de](mailto:medienecho@esperanto.de)

**Libroservo / Bücherdienst**

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, [buchversand@esperanto.de](mailto:buchversand@esperanto.de), [www.esperanto.de/buchversand](http://www.esperanto.de/buchversand)

**Komisiito Interreta Redaktado /**

**Beauftragter Internetredaktion**

**Thomas Bormann**, Durchwahl: -5117

[thomas.bormann@esperanto.de](mailto:thomas.bormann@esperanto.de)

**Vertreter des DEB in der EEU-Versammlung /**

**Reprezentanto de GEA en la asembleo de**

**EEU: Klaus Leith**

[klaus.leith@esperanto.de](mailto:klaus.leith@esperanto.de)

**Pliaj adresoj / Weitere Adressen**

**Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /**

**Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

[www.esperanto.de/gej](http://www.esperanto.de/gej) (Netzpräsenz)

**Interkultura Centro Herzberg (ICH) /**

**Bildungszentrum des D.E.B.**

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

[ich@esperanto.de](mailto:ich@esperanto.de), [www.esperanto.de/ich](http://www.esperanto.de/ich)

**Germana Esperanto-Instituto /**

**Deutsches Esperanto-Institut**

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), [martin.haase@esperanto.de](mailto:martin.haase@esperanto.de),

[www.esperanto.de/dei](http://www.esperanto.de/dei)

**Germana Esperanto-Biblioteko /**

**Deutsche Esperanto-Bibliothek**

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

[biblioteko@esperanto-aalen.de](mailto:biblioteko@esperanto-aalen.de)

[bibliothek-aalen@esperanto.de](mailto:bibliothek-aalen@esperanto.de)

[www.esperanto.de/bibliothek](http://www.esperanto.de/bibliothek)

**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung**

**Andreas Emmerich**, [estraro@fame-stiftung.de](mailto:estraro@fame-stiftung.de)

(nur por FAME)

## Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,  
030/6920 4846-1, [stiftungmondo@gmail.com](mailto:stiftungmondo@gmail.com),  
Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,  
BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

**Aŭstria Esperanto-Federacio /**

**Österreichischer Esperanto-Verband**

[aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at), [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at)

**Aŭstria Esperanto-Junularo /**

**Österreichische Esperanto-Jugend**

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

[aej@esperanto.at](mailto:aej@esperanto.at), <http://aej.esperanto.at>

**Esperantomuzeo Vieno /**

**Esperantomuseum Wien**

Palais Mollard, Herrngasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, [plansprachen@onb.ac.at](mailto:plansprachen@onb.ac.at), [www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)

**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-**

**beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA**

**Germanio / Deutschland**

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen siehe

mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

**Aŭstrio / Österreich**

**Leopold Patek**, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Postel. +43/66473611289,

[aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at)

**Esperanto aktuel**

ISSN 0942-024 X

**Eldonisto / Herausgeber**

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

**Redaktista teamo / Redaktion:**

**Stano Marček** (Martin/Slovakio),

**Yashovardhan Singh**, Im Johannistal 23, 42119

Wuppertal. Durchwahl: -54

**Kunlaborantoj / feste Beiträger:**

**Hermann Kroppenber** (Medienecho),

**Utho Maier** (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

**Presejo / Druck:** Alfaprint, Martin, Slovakio

**Esperanto aktuel** kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 19 €

(de eksterlando: 25 €) jare.

**Esperanto aktuel** mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 €

(Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

**Anoncoj / Anzeigen:**

Skribu al / Schreiben Sie an: [deb@esperanto.de](mailto:deb@esperanto.de)

**Kontribuoj / Beiträge**

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato \*.doc

a.s.) al [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), por n-ro 2021/6 ĝis la

15-a de novembro 2021. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format

\*.doc o.ä.) an [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de),

für Nr. 2021/4 bis zum 15. November 2021.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan (s.o.).





## Karaj legantoj,

pasis la somero, kaj laŭ mia impresoj la Esperanto-vivo post longa paŭzo reprovoksinigis al normaleco. Multaj el niaj grupoj denove fizike kunvenas. Okazas ankaŭ denove grandaj ĉeestaj kongresoj kiel tiu de Itala Esperanto-Federacio en Assisi. La italaj kongresoj kutime estas bone organizitaj kaj altiras partoprenantojn el multaj landoj. Tiu en Assisi ĉijare eĉ povis iom anstataŭi la Universalan Kongreson, kiu denove devis eskapi en la virtualan mondon. Kongresanoj ankaŭ el Germanio abundis. Raporton de Irina kaj Olga – niaj du oficejaj volontulinoj, kiuj vojaĝis al Assisi per stipendio el la Erasmus+-programo – vi trovos aliloke en ĉi tiu eldono. Por la kongreso en Italio validis striktaj reguloj por protekti sin kontraŭ la pandemio – pli striktaj, ol almenaŭ vakcinitaj personoj spertas en Germanio. La kronvirusa disciplino restos kun ni ankoraŭ longe, kaj certe ni faru ĉion por eviti ke Esperanto-renkontiĝoj disvastigu la viruson.

Tio validas ankaŭ por la venontaj eventoj planataj de GEA, ekzemple la aŭtuna migrado meze de oktobro. Ĝin ni sukcese reenkondukis pasintan jaron malgraŭ la pandemaj limigoj. Post Hitzacker en 2020 Gerald Roemer nun kondukos nin al la ĉirkaŭaĵo de Neustadt/Weinstraße. Ankaŭ por la venontaj jaroj jam ekzistas proponoj. Mi ĝojas ke tiu tradicia evento denove trovas fidelan partoprenantaron. Estus nur bone, se en la venontaj jaroj – kaj espereble sen kontraŭvirusaj limigoj – ni sukcesus iom pli internaciigi ĝin. Alian tradician eventon, la jarfinan renkontiĝon Luminesk', ni pasintjare devis virtualigi. En ĉi tiu jaro ni riskas denove plani ĉeestan eventon kaj por tio elektis la

junulardomon en Münster/Westfalen. Aliĝoj ĝis nun alvenas malrapide. Ŝajnas ke precipe inter regulaj partoprenantoj el eksterlando ankoraŭ regas duboj, sub kiaj cirkonstancoj kaj kun kiaj atestiloj je tiu tempo de la jaro eblos vojaĝi kaj renkontiĝi. GEA povas nur garantii ke – se Luminesk' pro kontraŭvirusaj limigoj ne povos okazi aŭ aliĝinto pro tiu kaŭzo ne povos veni – ĝi repagos la antaŭpagitan monon. Tiun promeson ni en la pasinteco jam plurfoje plenumis.

Kiel vi memoras, la ĉijara germana-pola-fervojista kongreso povis okazi nur virtuale. Nia statuto postulas jarĉefkunvenon ("Federacian Asembleon") almenaŭ unu fojon jare. En 2021 ni ankaŭ devos elekti novan estraron. La nuna estraro decidis ne riski tiom grandan kaj longdaŭran retan eventon, des pli ĉar necesos preciza kontrolo de ĉeestantoj kaj pluraj voĉdonoj. Ni do (kiel jam en 2020) prokrastis la asembleon al la dato de la aŭtuna kunveno de la Asocia Konsilantaro apud Herzberg. Ĉiu membro de GEA estas bonvena partopreni. Invito kaj tagordo por la 30-a de oktobro jam estas publikigitaj. Mi esperas pri multnombra partopreno. En tiu kunteksto mi plurfoje aŭdis la peton pri ebleco virtuale partopreni. Ni klopodos tion aranĝi per nia tekniko kaj kun la afabla helpo de Heinz Sprick. Sed la spertoj el 1 ½ jaroj da pandemio montras ke oni ne tro facilanime promesu „hibridajn“ kunvenojn. Nur-virtualaj eventoj, dum kiuj ĉiu sidas antaŭ sia komputila ekrano, estas organizeblaj, eĉ kun pluraj paralelaj kunsidoj. Tion pruvis ne laste nia kongreso en majo. Sed „hibridaj“ eventoj kun surloka kaj reta partopreno postulas pluroblan teknikan ekipaĵon, pluroblan da fakuloj kapablaj manipuli ĝin – kaj sufiĉe fortan reton en la kunvenejo. Tiun problemon eĉ pli ol ni havas UEA, kun kies prezidanto Duncan Charters ni povis interŝanĝi spertojn dum lia vizito al Berlino komence de septembro okaze de seminario pri la historio de la Esperanto-movado.

Jen mia hodiaŭa ĝisdatigo. Mi ĝojas revidi plejeble multajn el vi fine de oktobro en Osterode, laŭeble multajn surloke en "Freiheimer Hof", kaj eble eĉ sen maskoj!

Amikajn salutojn

Ulrich Brandenburg

## Enhavtabelo/Inhalt

**1:** La urbo Osterode am Harz, en kiu okazos fine de oktobro 2021 GEA-Semajnfino kaj Federacia Asembleo.

**2:** Adresoj.

**3:** Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavo.

**4-6:** Interkultura Centro Herzberg:

Informationstafel über den Großen Knollen jetzt auch in Esperanto. Ĉu "Esperanto-volontulado" helpas? Esperanto-Büchergeschenke aus Skandinavien für die Stadtbücherei. Por la monato novembro 2021 Esperanto-helpanto serĉata. Neue Sonderausstellung im Museum des Welfenschlosses „Firmen- & Produktnamen in Esperanto“ eröffnet. Kalendaro 2021/22.

**7-10:** Aŭstria Esperanto-Federacio:

Rakonto pri vojaĝo tra la tempo. Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado. Reise eines deutschen Professors ins Eldorado. Vikidatumoj (Wikidata).

**11-12:** Aranĝoj: Jarfina renkontiĝo

Luminesk' ĉi-jare en Münster. Mit Erasmus+ zum Esperanto-Kongress nach Italien. Unuiĝintoj por paco.

**13-14:** Medienecho

**15-16:** Publika agado: EU-Zukunfts-konferenz 2021-22.

**17-20:** El bibliotekoj kaj arkivoj:

Folge 62 – Neuanschaffungen und einige Bemerkungen dazu.

**21-22:** Recenzo: Valora folkloro kolekto.

**23-24:** Esperanto ĉiutage: KREO

zitiert auf Esperanto. Online-Esperanto-kurs für Anfänger. Terminaro Someraj Olimpiaj Ludoj.

**25-31:** kune – revueto de Germana

Esperanto-Junularo: Pri la travivludo „Vintage Story“. Hallo liebes Mitglied. Haushaltsplan der DEJ für 2022. Bericht vom Planungstreue in Wittenberg 28./29.8.28. KEKSO in Schwerte. Malnovaĵoj de GEJ – Reuiniĝo, kaj la 70-jara jubileo.

**30:** Kalendaro.

**31:** Recenzo: La Revolucio malantaŭ la Ĉaro.

**31:** Fotoj: La urbo Osterode am Harz.



# Informationstafel über den Großen Knollen jetzt auch in Esperanto

Der Große Knollen ist mit 687 m Höhe der höchste Berg des Südhazes und wird auch oft als der "Brocken des Südhazes" bezeichnet.

Für Herzberg am Harz...die Esperanto-Stadt hatte das Esperanto-Centro in Herzberg in Abstimmung mit der Verwaltung eine Informationstafel in Esperanto und auf Deutsch anfertigen lassen. Seit über fünfzehn Jahren ist die Stadt Herzberg aufgrund eines Ratsbeschlusses auch "die Esperanto-Stadt". An vielen markanten Punkten, z.B. am Lonau-Wasserfall, bei der Einhornhöhle, an der Rhumequelle, beim Schlosseingang, usw. gibt es bereits zweisprachige Informationstafeln. Das ist u.a. für Gäste und Touristen eine Besonderheit, die zudem auch in vielen Medien sehr positiv erwähnt wird.

Das schöne und wetterfeste zweisprachige Schild am Wirtshaus Knollenbaude informiert die Besucher über den Berg, die Natur, den Aussichtsturm mit dem



Restaurant. Zur kleinen Einweihung waren neben einer Esperanto-Delegation mit Gästen aus Frankreich und den Niederlanden auch Delegationen des Harzklubs Herzberg, der Zukunftswerkstatt Herzberg und des Fördervereins Knollenturm erschienen.

Darüber freuten sich der Knollenwirt Sven Wode und der Leiter des Esperanto-Zentrums Peter Zilvar sehr.

Bild: Gruppenfoto bei der Einweihung der Informationstafel



## Ĉu "Esperanto-volontulado" helpas?

Je kadro de Erasmus-projekto de EU staĝas ĉe ni franca lingvistino. Temas pri la esplorado rilate al "volontulado" entute.

La gvidado de tiu interesa kaj praktika EU-projekto estas en la manoj de Esperanto-Centro en Toulouse (Francio). La projektpartneroj troviĝas en Toulouse (Francio), ĉe TEJO en Rotterdamo (Nederlando), en Bialistoko (Pollando), Skotlando, Italio kaj ĉe la Esperanto-Centro (ICH) en Herzberg.

La Erasmus+ projekto entute komenciĝis en septembro kaj daŭros probable ĝis marto 2022, kun bonŝanco je plilongigo ĝis somero 2022. La partneroj havas ankaŭ organizajn renkontiĝojn, fakajn interparoladojn, ktp.



Momente voluntulas ĉe ni por kelkaj monatoj sinjorino Jade el Francio. Ekzemple ŝi praktike helpas ĉe la ordigadoj kaj listigadoj de gazetoj kaj libroj kaj ĉe aliaj aktualaj taskoj.

La kernemo estas la diversaj formoj kaj tipoj de volontulado mem. Ekzistas ja plej diversaj formoj kaj imagoj. Ĉu ekzistas iaj normoj laŭ la ĝisnunaj spertoj?

Komprenoble la volontuloj partoprenas la lokajn kaj regionajn Esperanto-renkontiĝojn, seminariojn, aktivecojn, ktp.

Same ni ĝojas, ke en septembro 2021 staĝis ĉe ni Andries el Nederlando.

## Esperanto-Bücher-geschenke aus Skandinavien für die Stadtbücherei

In den letzten Jahren bekam das Esperanto-Centro in Herzberg etliche Büchergeschenke aus verschiedenen Ländern, u.a. auch für die Präsentation und Nutzung in der Stadtbücherei Herzberg.

So bekamen wir in diesem Sommer beispielsweise eine Serie von Büchern von Familie Hämäläinen aus Helsinki in Finnland.

Eine größere Menge von Büchern für die Nutzung in der Stadtbücherei Herzberg stammt von dem Buchverlag Esperanto durch Leif Nordenstorm aus Uppsala in Schweden. Diese Bücher wurden von einer Schwedischen Stiftung für das Erlernen von Fremdsprachen finanziert und sollen in öffentlichen Bibliotheken angeboten werden.

Deshalb sind diese Leihgaben bzw. speziellen Schenkungen auch in der Stadtbücherei Herzberg zu finden. Etlichen esprantosprachigen Gästen, auch aus verschiedenen



europäischen Ländern, wurden diese Bücherschenkungen gezeigt und auch erklärt.

Viele Bücher, wie Romane, die von Autoren aus vielen Ländern stammen, waren den Besuchern der Stadtbücherei noch nicht bekannt.

Diese neuen Bücher und reichhaltige Büchersammlungen können während der Öffnungszeiten der Stadtbücherei Herzberg am Harz "vor Ort" gelesen und auch ausgeliehen werden.

Foto: Ein interessierter Sprachstudent in der Stadtbücherei Herzberg

## Por la monato novembro 2021 Esperanto-helpanto serĉata


Estas ĉiam multaj urĝaj taskoj, kiujn nia eta teamo ne povas plenumi, ĉar la taskoj kaj bonŝancoj favore al Esperanto kreskas.

Por novembro 2021 ni bezonas ankoraŭ helpantojn. Poŝmonon kaj veturkostojn ni povos pagi dank' al subteno de la Esperanto Landa Ligo en Malsupra Saksio. Por tio ni tre dankas favore por Esperanto.

Taskoj povos esti ekzemple ordigadoj kaj listigadoj de gazetoj kaj libroj, ktp.

Interesiĝantoj bonvolu baldaŭ kontakti nin telefone: 05521-5983, aŭ rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

**Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6,  
DE-37412 Herzberg am Harz  
– la Esperanto-urbo. Tel. 05521-5983  
E-mail: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)  
hejmpaĝo: [esperanto-urbo.de](http://esperanto-urbo.de)**





## Neue Sonderausstellung im Museum des Welfenschlosses „Firmen- & Produktnamen in Esperanto“ eröffnet

**Bereits die 16. Sonderausstellung in Bezug auf Esperanto wurde auf der oberen Plattform im Museums des Herzberger Welfenschlosses mit Gästen aus Belgien, Deutschland, Estland und den Niederlanden eingeweiht. Wegen der Pandemie-Auflagen konnte nur eine kleine Delegation dabei sein.**

In den letzten Jahren gibt es weltweit immer mehr Produkte, Firmennamen, usw. in Esperanto.

Das älteste Ausstellungsobjekt ist die Zither „Esperanto“, die ca. 1910 von einer gleichnamigen Firma in Sachsen hergestellt wurde. Dieses frühe Exemplar wurde unlängst vom Herzberger Esperanto-Centro ersteigert! Die bekannte Nürnberger Firma TEMPO (=Zeit) produziert seit langer Zeit Papiertaschentücher.

Das Erfrischungsgetränk der Firma PepsiCo „Mirinda“ erhielt vor langer Zeit einen Namen in Esperanto. Es bedeutet „wundernswert“, zusammengesetzt aus den Wortstämmen wundern + wert.

Aus unserer Region gibt es auch ein frühes Beispiel. Der Osteroder „Lichtarzt“ Dr. Breiger erfand bereits vor dem Weltkrieg I eine frühe elektrische Höhensonne mit einem Esperanto-Namen „Altmontara Sun“ (Hochgebirgssonne). Der Südharzer Erfinder zog nach Berlin um und eröffnete große Behandlungszentren. Mit seinen Ärzten sprach er meistens Esperanto.

Hier einige weitere Namensbeispiele: Vasta (Saunaofen) aus Finnland im Jahre 1966

Belsona (tragbares Tonbandgerät) aus Japan bereits im Jahre 1962

### Firmennamen & Produkte aus unserer Umgebung:

Pano (Brot) heißt ein Café in Bad Lauterberg

Kulero (Löffel) aus Göttingen ist neue aktive Firma, welche essbare Bestecke produziert.

BONVENO (Willkommen) heißt ein Flüchtlingsheim in Göttingen.

Einige Schweizer Luxusuhren mit Esperanto-Namen gibt es bereits ab ca. 1910:

RADO, MOVADO, ETERNA. Weitere Uhrenhersteller mit esperantosprachigen-Namen, z.B. Adora, Esperanto sind häufig zu finden.

Einige Blumennamen:

Zamenhof-Kletterrose (Züchtung von Dr. Gustav Brada aus Böhmen)

Esperanto-Rose (Züchtung von Jan Böhm aus Böhmen)

Die Tulpe „Esperanto“ ist eine wunderschöne Züchtung aus den Niederlanden

Clematis „Esperanto“

Sie finden alltäglich viele verschiedene Produkte im modernen Handel, z.B. favora, mola, pura, pure, usw.

Auch gibt es etliche Autobezeichnungen, wie Espero (Hoffnung). Fast unendlich viele Firmen und Projekte mit Bezeichnungen oder Namen betreffen die Kunst und Kultur, Informatik, Erfindungen, Kreationen, Musikgruppen, etc.

Auch der Name für den bekannten Impfstoff „moderna“ entspricht der internationalen Logik der Esperanto-Sprache (einschließlich der entsprechenden Aussprache).

Die Kryptowährung MONERO ist recht bekannt und heißt wörtlich übersetzt „Geldstück“.

## Kalendaro 2021/22

**Multaj Esperanto-renkontigoj denove eblas; kompreneble pro la pandemio, ekzemple kun la kutimaj sekurecdistancoj, maskoj, ktp. Krome ekzistas E-ofertoj en virtuala formo. Bonvenon!**

**Dienstags regelmäßig ab 16:45 h** unser „Esperanto-Klub“(LEB) z.Zt. im Esperanto-Garten!

**Ĉiam marde 19 h** Esperanto-Klubo (LEB) rete per UEA: Buntaj vesperoj, diversaj temoj, interparoladoj, informoj, internaciaj gastoj, kantoj, ktp: ICH Herzberg.

**14.10. - 17.10.21** Europäische Minderheiten- & Sprachenkonferenz der FUEN, Helsinki

**17.10.21 – 22.10.21** Esperanto Migrado de GEA en Palatinato (Pfalz), ĉirkaŭ Neustadt a.d. Weinstraße

**29.10. – 31.10.21** GEA-Semajnfino en la najbara urbo Osterode kaj Herzberg, bonvenon!

**30.10.21 14:30** JHV 2021 des Deutschen Esperanto-Bundes in Osterode „Freiheiter Hof“

**12.11. – 14.11.21** Esperanto-Wochenendkursus im Esperanto-Centro (ICH) in Herzberg

**10.12. – 12.12.21** DEB-Weiterbildungsseminar, Zamenhof- & Weihnachtsfeier am 11.12.21, Herzberg

**28.12. – 04.01.22** JES – Junulara Seminario en Wittenberg, i.a. kantos Vagabondoj 30.12.21

**28.12. – 03.01.22** LUMINESK - das Silvestertreffen des Deutschen Esperanto-Bundes in Münster

**04.03. - 06.03.22** Esperanto-Weiterbildungsseminar (DEB-Filiale) in Herzberg

**18.03. – 20.03.22** Esperanto-Wochenendkursus im Esperanto-Centro Herzberg

**11.04. – 18.04.22** PSI (Printempa Semajno Internacia) en Braunschweig

**03.06. – 06.06.22** Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg; temo: „Daŭripovo“

## Rakonto pri vojaĝo tra la tempo

**Esperantigis Franziska Dodik. Originala titolo: Прича о нүтовању кроз време de Patro Predrag Popovic. En YouTube: <https://youtu.be/hEGaoraQv-0>**

Mi tute ne rakontis al vi, kiel aspektas la vivo en la futuro. Mi rakontis diversajn rakontojn, el kiuj oni povas ion lerni, sed la futuro... La futuro, pri kiu mi parolas, okazas malproksime de nun, eble en cent jaroj. Ĝi estas, por tiel diri, programita. Oni scias ĉion, kiu faras kion, kiu pensas kion, kaj por esencaj aferoj ne estas loko. Ni esence ekzistis tie. Homa vivo plilongiĝis. Sed tio nun ne gravas. Tio, kio gravas, estas tiu ĉi rakonto. Mi rakontos al vi, kiel ĉio komenciĝis, kaj de kie mi venas ĉi tien.

Mi sentis enuon kaj iris en la muzeon. En la muzeo vi ne havas gvidantojn, vi havas virtualan hologramon. Ĝi estas via gvidanto, kiu gvidas vin tra la muzeo. Vi demandas ĉion, kion vi volas demandi, ĝi respondas al vi, kaj gvidas vin kien vi volas iri. Ĉiuj vizitantoj havas sian propran hologramon.

Kiam mi observis diversajn objektojn, mi vidis unu objekton, kiu aspektis perfekte. Mi neniam antaŭe vidis ion pli belan kaj tiel enigman. Ĝi estis rektangula laŭ formo kaj aspektis kiel farita el natura materialo. Mi demandis tiun ĉi roboton, kiu gvidis min: "Kio estas tio?" Li diris: "Tio estas libro." - "Kio estas libro?" - "Libro estas io plej simila al nia blogo, kiun ni havas."

Plejparte li diris, ke oni faras la libron el papero, kio estas derivaĵo de ligno, ke multaj arbaroj estis tranĉitaj pro la produktado de tiu papero, kaj ke la produktado de tiu papero estas strikte malpermesita, mi ne scias en kiu jaro.

Skribado sur tiu papero estis farita per inko, komence de ansera plumo, poste per globkrajonoj, inkplumoj ktp. Ke la homo mem, kun sia mano, skribis leterojn, librojn, kantojn, kaj tio kion li sentis. Mi miris pri tio kion mi aŭdis, ĉar ĉe ni oni ĉiam rakontis en kritika maniero pri la objektoj, kiuj troviĝas en la muzeo, fine ili pravigas la manieron. Kiel ĝi nun ekzistas kaj diras, ke oni malpermesis librojn kun bona kialo. Ni nun havas elektrajn helpilojn kaj la homo ne havas bezonon por skribi, sed oni parolas kaj tio estas registrita sur iun servilon. Ĉiam, kiam oni volas, oni povas uzi blogon, kie oni registris kaj aŭdis siajn pensojn, ekzakte kiel oni diris. Ne ekzistas plu skribado, ne ekzistas plu legado, ĉion oni faras tiel. Mi demandis, kie mi povas ricevi tiun ĉi libron, sed oni diris, ke libroj estas strikte malpermesitaj. La lastaj ekzemploj pri tiu ĉi mondo estas garditaj en la muzeoj. Ĉu tamen ne ekzistas iu loko, kie troviĝas similaj libroj, mi demandis denove. Ĝi diris al mi, ke ekzistas biblioteko. Ĝi gvidis min al la biblioteko, kiu troviĝis en unu aparta ĉambro, antaŭ kiu staris unu speco de elektronika kurteno, kiu aspektis kiel vitro, sed ne estas vitro, sed nur areo, kvazaŭ aera limo, tra kiu vi ne povas simple eniri. Malantaŭ tiu ĉi aera limo troviĝis diversaj libroj kaj oni konservis specialan klimaton, kiu konvenis al tiuj libroj.

Mi estis fascinita. Mi nur rigardis el malproksimeco kaj provis tralegi titolojn, kiuj estis skribitaj sur la librokovriloj. Estis vere mirinda sento. Mi sidis kaj rigardis en tiu biblioteko kaj provis eltrovi, kio estas libro, kio estas skribita en tiuj libroj, kaj mi vidis, ke unu viro eniris en tiun ĉi ĉambron. Mi estis surprizita kaj demandis min, de kie venas tiu ĉi viro, ĉar ni al kutimiĝis, ke nek en la vendejoj estas homoj kaj nenie estas homoj.

Ĉio farita estas robotike farita, ĝi estas farita per la plakoj, kiujn ili instalas al ni, ĉio estas elektre farita. Homoj estis nur ia laboristaro. Ili diris al ni, se ni faras ion por iu, se ni plenumas ian servon, ke ni per tio subtakas nin mem, kaj ke tio estas diskriminacio. Kial iu laborus kiel vendisto aŭ vendistino kaj ke iu aĉetus kaj tiel metus sin super lin/ŝin. Neniam mi pensis pri tio, kaj por diri al vi la veron, al ni estas malpermesite pensi.

Ĉiuokaze viro envenis, ion purigis, malfermis librojn...

Mi estis surprizita. Mi vidis, ke ekzistas pordoj, mi forlasis la muzeon, iris malantaŭen kaj atendis lin. Li eliris kaj mi diris: "Bonan tagon! Pardonu ke mi demandas tion al vi, sed kiel vi povas eniri ĉi tien?" Li diris, ke li venas ĉi tien kaj konservas librojn, kiujn li devas malfermi de tempo al tempo, la paĝoj de libroj bezonas ankaŭ freŝan aeron, por ke ili ne komencu iĝi ŝimaj ktp., kaj ke tio estas lia laboro. Mi daŭrigis kaj demandis: "Mi scias, ke tio, kion mi demandas vin, estas malpermesite, kaj ke ni ambaŭ povus esti kulpaj, sed ĉu ekzistas iu ebleco, ke vi kunportos al mi iun de tiuj libroj, iun ajn? Mi dezirus legi ĝin kaj kompreneble mi pagos al vi por tiu ĉi servo, kaj redonos al vi la libron. Mi tiel deziras legi tiujn librojn."

En unu momento, la viro kvazaŭ volis plori kaj li diris: "Filo, tio estis mia laboro." Tiu ĉi viro ankaŭ mem verkis iujn el tiuj libroj, kiuj staras tie. Poste li fariĝis bibliotekisto, kaj poste, kiam ili fermis la bibliotekojn, li luktis por resti tie, por ke li povu resti kune kun libroj kiuj estis leĝe malpermesitaj. Li deziris daŭre legi ilin kaj rememori pri ĉio kio iam estis. Li rakontis al mi, ke antaŭ multaj jaroj bibliotekistoj eldonis librojn al homoj. Antaŭ ol li foriris, li demandis: "Kiu libro interesas vin?" Mi diris: "Iu ajn, ĝi devus nur havi rilaton al la senco de la vivo, kun la esenco, kun la pasinteco, kun homoj, ĉar la vivmaniero en kiu ni vivas, estas vere trista. Mi sentas min malplena." Li iris en la ĉambron kaj kunportis al mi unu libron, kiun mi rapide metis en mian dorsosakon kaj foriris.

Kiam mi la unuan fojon prenis la libron kaj sentis sub miaj fingroj tiun ledan bindadon, kaj la odoron de la libro kiam oni malfermas ĝin, kaj sonon de la paĝo, mi komencis plori. La viro diris al mi, ke mi ne rajtas damaĝi la libron, kaj ke mi devas ĝin redoni en la kondiĉo, en kiu mi prenis ĝin. Sed diable, kiom ajn mi provis, mi tute ne povis ne difekti la libron. Miaj larmoj falis sur multajn paĝojn kaj ili iom tordis tiujn paĝojn.

Li ne ĉagrenis. Li diris, ke kun la tempo ĝi malboniĝos. Mi legis libron post libro. Mi aparte ŝatis la historion de la homoj kaj rakontoj kiel homoj antaŭe estis liberaj. Vi devas scii, ni ne plu estas.

Ni nun loĝas en rezervejo. Ekzistas klanoj, kiuj malakceptis la novan mondan ordon kaj la gvidantoj de ĉi tiu mondo metis ilin en rezervejojn. Ili ne multe plendis pri devo iri tien. Temas pri grandaj verdaj areoj. Al ni estas severe malpermesite iri tien, kaj ili ankaŭ ne rajtas eniri en nia mondon, ĉar ili rifuzis vivi kiel ni.

# Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado

Informis min pri la vojaĝo de la fama aŭstra teoria fizikisto prof. Ludwig Boltzmann al Kalifornio en 1905 kaj ties sprita raporto astronomia kolego prof. Arne Slettebak de la Ŝtata Universitato de Columbus, Ohio, Usono.

Atentigite de li pri angla traduko de tio en la ĵurnalo „Physics Today“ en 1992, mi evoluigis la ideon traduki ĝin ankaŭ al Esperanto, ĉar Boltzmann priskribis siajn problemojn kun la angla lingvo, en kiu li devis prezenti 30 prelegojn en la Universitato de Berkeley en Kalifornio. Konkrete li kritikis la nefonetikan karakteron de tiu lingvo. Simbola voko al esperantigo venis de la fakto, ke lia vojaĝo okazis en somero 1905, samsezone kun la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo ĉe Maro (5-12 de aŭgusto). Boltzmann okupiĝis ankaŭ pri reformo de la germana ortografio kaj en la sama libro, kie aperis tiu raporto, li startas per „Forwort“

# Reise eines deutschen Professors ins Eldorado

Über die Reise des berühmten österreichischen theoretischen Physikers Prof. Ludwig Boltzmann nach Kalifornien im Jahr 1905 und seines geistreichen Berichtes informierte mich mein astronomischer Kollege Prof. Arne Slettebak von der State University Columbus, Ohio, USA.

Er machte mich auf die englische Übersetzung davon in der Zeitschrift „Physics Today“ von 1992 aufmerksam und so wuchs in mir die Idee einer Übersetzung auch ins Esperanto, weil Boltzmann seine Probleme mit der englischen Sprache beschrieb, in der er 30 Vorlesungen an der Universität Berkeley in Kalifornien zu halten hatte. Konkret kritisierte er den nichtphonetischen Charakter dieser Sprache. Ein symbolischer Aufruf zur Übersetzung ins Esperanto war die Gleichzeitigkeit seiner Reise nach Kalifornien mit dem ersten Universala Kongreso de Esperanto in Boulogne-sur-Mer 1905. Boltzmann befasste sich auch mit der Reform der deutschen Rechtschreibung, denn im selben Buch, in dem auch sein Bericht erschien, startet er mit einem „Forwort“



Ludwig Eduard Boltzmann (1844–1906) estis monde fama aŭstra fizikisto. En siaj *Popularaj Artikoloj* (*Populäre Schriften*) li skribis interalie pri preleg-vojaĝo al Kalifornio, kiun li faris en 1905. Ĉi tiu raporto aperas en paralela esperanta-germana eldono, kun komentoj en Esperanto, interalie pri la multaj citaĵoj, kiujn Boltzmann enmetis en sian artikolon.



Hans Michael Maitzen (n. 1943 en Graz) estas aŭstra astronomo studinta en la Universitato de Graz, doktoriĝis tie en 1967 kiel Dr. phil. per astrofizika disertacio pri la Einstein-a ruĝigo de steloj. Post soldat servo kaj deĵoro en la simobservatorio Kanzelhöhe (Karintio) li eklaboris en 1969 en la Astronomia Instituto de la Ruhr-Universitato Bochum (FRG), kaj tiel kiel unua aŭstro povis utiligi la elstarajn astronomiajn observkondiĉojn de la Eŭropa Suda Observatorio (ESO) en Ĉilio. Reveninte en 1976 al Aŭstrio kiel scienca asistanto de la Viena Universitata Observatorio li lanĉis kampanjon, ke ankaŭ Aŭstrio membrigu en ESO, kio estis sukcese atingita en 2008. En 1989 li fariĝis eksterorda profesoro. Li estas profesoro en AIS San Marino (ties prezidanto 2012–2015, nun vicprezidanto). Esperantisto ekde 1961, TEJO-prezidanto 1968/69, ĉef-reprezentanto de UEA en la sidejo de UN Vieno.



Reinhard „Renardo“ Fössmeier (n. 1955) estas germano vivanta en Munkeno. Esperanton li eklernis en 1976. Li magistriĝis en 1980 pri matematiko ĉe Technische Universität München (TUM) kaj tie doktoriĝis en 1984. En 1989 li habilitiĝis pri informadiko ĉe AIS San-Marino, kies membro li estas de 1995. Ekde 1990 li laboris en informadikaj entreprenoj kaj specialiĝis pri rete distribuitaj aplikajoj. En 2015 li sendependiĝis kiel liberprofesia konsilisto. Honorofice li instruas ĉe AIS kaj en la universitato Lucian Blaga en Sibio (Rumanio). Li publikigis fakan libron kaj keldek sciencajn kaj teknikajn artikolojn, kontribuante al la omaĝvolumoj „La arto labori kune“ (por H. Tonkin) kaj „Littera scripta manet“ (por H. G. Frank).

ISBN 978-80-88326-19-9



9 788088 326199

K A V A - P E C H


Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado

Ludwig Boltzmann

Ludwig Boltzmann

VOJAĜO DE GERMANA PROFESORO AL ELDORADO

Reise eines deutschen Professors ins Eldorado



Elgermanigis: Hans Michael Maitzen

Kun komentoj de Hans Michael Maitzen kaj Renardo Fössmeier

K A V A - P E C H

Aŭstria Esperanto-Federacio / Österreichischer Esperanto-Verband

kun kompleta koincido de la skriba kaj parola germana lingvo, gvida principo por la lingvo de d-ro Zamenhof! La entrepreno komenciĝis en aprilo 2021 kun grava partopreno de kolego prof. Reinhard (Renardo) Fössmeier de la Akademio Internacia de Sciencoj (San Marino), kiu krom gravan logistikan engaĝigon kontribuis signifan parton de la komentoj en nia libro. La libro estas mendebla ĉe UEA kaj ĉe KAVA-PECH. ISBN: 9788088326199.

2021-09-06 Hans Michael Maitzen

# Vikidatumoj (Wikidata)

Ni ĉiuj konas Vikipedion (Wikipedia), la interretan enciklopedion. Ĝi estis fondita en la jaro 2001, do antaŭ 20 jaroj.

Vikipedio enhavas multege da interesaj kaj valoraj artikoloj. Bedaŭrinde la enhavo de la artikoloj nur malfacile estas aŭtomate traserĉebla. Ekzemple, se vi volas scii, kiom da Esperanto-monumentoj ekzistas en la mondo.

Por tio pli bone taŭgas Vikidatumoj (WikiData). Fondita en la jaro 2012, ĝi estas kolekto da objektoj, simile al Vikipediaj artikoloj. Ĉiu objekto havas kodon Qnnn, kie nnn estas sinsekvo da ciferoj.

Ekzemple eblas serĉi artikolon pri Zamenhofa monumento, Vieno. Estas propra artikolo en Vikidatumoj. Ĝi havas la kodon Q38007732 kaj estas trovebla ĉe <https://www.wikidata.org/wiki/Q38007732>.

Tie estas listigitaj diversaj “atributoj” de la preparolita objekto. Ekzemple la Zamenhof-monumento “estas” (P31) “Zamenhof/Esperanto-objekto” (Q75762). Kaj ĝi “troviĝas en listo de kulturaj heredaĵoj” (P2817).

Zamenhofa monumento, Vieno (Q38007732)

monumento en la centro de la urbo

En pluraj lingvoj

Deklaroj

estas

Property:P31

prolektita monumento

+ 1 referencoj

Zamenhof/Esperanto-objekto

Q75762

+ 0 referencoj

en listo de kulturaj heredaĵoj

Property:P2817

Q1531729

+ 0 referencoj

Kiamaniere traserĉi la Vikidatuman datumbazon? Ni donas ekzemplojn.

Ekzemplo 1: Kiom da aliaj Zamenhof/Esperanto-objektoj estas troveblaj? Por traserĉi Vikidatumojn, sufiĉas viziti

und versucht die vollständige Übereinstimmung von geschriebener und gesprochener Sprache, ein Leitprinzip für die Sprache von Dr. Zamenhof! Unser Unternehmen begann im April 2021 mit der Teilnahme von Prof. Reinhard (Renardo) Fössmeier von der Akademie Internacia de la Sciencoj (San Marino), der neben seinem sehr wichtigen logistischen Engagement einen signifikanten Teil des Kommentars in dieser Publikation beitrug. Das Buch ist bei UEA und bei KAVA-PECH erhältlich. ISBN: 9788088326199. 2021-09-06 Hans Michael Maitzen

<https://query.wikidata.org/> kaj entajpi kelkajn liniojn da teksto.

Wikidata Query Service

Ekzemploj

Query Builder

Helpo

```
1 # Zamenhof-monumento
2 SELECT ?objekto ?objektoLabel |
3 WHERE
4 {
5   ?objekto wdt:P31 wd:Q75762. # estas (P31) Zamenhof-objekto (Q75762)
6   SERVICE wikibase:label { bd:serviceParam wikibase:language "eo" }
7 }
```

Linioj por demando, en <https://query.wikidata.org/>

Enmomente (la 23-an de Septembro 2021) ĝi redonas 127 rezultajn objektojn.

| objekto      | objektoLabel                                    | landoLabel |
|--------------|-------------------------------------------------|------------|
| wd:Q63253375 | 51-a Bazilemejo Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko | Pollando   |
| wd:Q56753941 | Avenue Dr Zamenhof, Anderlecht                  | Belgio     |
| wd:Q201017   | Bona Espero                                     | Brazilo    |
| wd:Q3847076  | Centro Ludoviko Zamenhof                        | Pollando   |
| wd:Q45320097 | Doutor Luiz Lázaro Zamenhof                     | Brazilo    |
| wd:Q19016404 | Dr Zamenhofstraat, Schiedam                     | Nederlando |
| ...          | ...                                             | ...        |

Rezulto 1: Zamenhof-objektoj en la mondo

Ekzemplo 2: Ekzistas famaj esperantistoj, kiel ekzemple Kálmán Kalocsay (Q12628).

Ni interesiĝas pri la jenaj informoj: Pri kiuj homoj scias Vikidatumoj, kies okupo (P106) estas esperantistoj (Q860918)?

Kiuj el tiuj samtempe havis okupon (P106) poeto (Q49757)?

Per tiu kodo Vikidatumoj donas la informon:  
# Esperantistaj poetoj  
SELECT ?objekto ?objektoLabel  
WHERE  
{

?objekto wdt:P106  
wd:Q860918. # Esperantisto  
?objekto wdt:P106  
wd:Q49757. # poeto  
SERVICE  
wikibase:label {  
bd:serviceParam  
wikibase:language "eo, de,  
en" }  
}

| objekto      | objektoLabel           |
|--------------|------------------------|
| wd:Q3564857  | Josef Rumler           |
| wd:Q3848779  | Miroslav Irčan         |
| wd:Q11774108 | Dalibor Chalupa        |
| wd:Q3509945  | Jiří Karen             |
| wd:Q3735234  | Hendrik Adamson        |
| wd:Q12344614 | Adalberto Huleš        |
| wd:Q3827257  | Ramón Fernández Jurado |
| wd:Q3889237  | Feliks Zamenhof        |
| wd:Q3891877  | Leo Belmont            |
| wd:Q3892599  | Eugenio Miñalski       |
| wd:Q4159595  | Georgo Deškin          |
| ...          | ...                    |

Rezulto 2 (entute 131 objektoj)

8 Esperanto aktuell 5/2021 № 269


Esperanto aktuell 5/2021 № 269 9



**Ekzemplo 3:** Zamenhofa monumento en Vieno estas kultura heredaĵo. Kiom da aliaj kulturaj heredaĵoj troviĝas en Vieno?

```
# kulturaj heredaĵoj
SELECT DISTINCT ?objekto ?objektolabel ?landolabel ?loko
WHERE
{
  ?objekto wdt:P2817 wd:Q1531729. # kultura heredaĵo (P2817)
  ?objekto wdt:P625 ?loko. # havas geografiajn koordinatojn (P625) ?
  ?loko
  ?objekto wdt:P131* wd:Q1741. # troviĝas en (P131) Vieno (Q1741)
  ?objekto wdt:P17 ?lando. # estas en lando (P17) ?lando
  SERVICE wikibase:label { bd:serviceParam wikibase:language "eo, de" }
```

Ĉar ni aldonis ankaŭ la geografian koordinaton (la variablon? loko) en la rezulton, eblas per simpla musklako montri la rezultojn en mapo.



Rezulto 3: mapo de kulturaj heredaĵoj en Vieno (<https://w.wiki/4987>)

Pli profundajn informojn vi trovas en interreto, ekzemple ĉe <https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikidatumoj>

Alfred Heiligenbrunner, 2021-09-23

Ankündigung der nächsten

## Generalversammlung des Österreichischen Esperanto-Verbandes (AEF)

Wann: Sa, 2022-01-22 13 Uhr

Wo: Cafe Frey, Favoritenstraße 44, 1040 Wien

### Tagesordnung:

- 1.) Begrüßung, Feststellung der Beschlussfähigkeit.
- 2.) Genehmigung der Tagesordnung.
- 3.) Protokoll der letzten Generalversammlung.
- 4.) Bericht des Obmanns, des Kassiers und der Rechnungsprüfer.
- 5.) Entlastung des Vorstandes.
- 6.) Neuwahl des Vorstandes und der Rechnungsprüfer.
- 7.) Abstimmung über sonstige Anträge und Allfälliges.

(2021-09-15 Alfred Heiligenbrunner)

## Anonco pri Zamenhoffesto en Vieno

Sabate la 11-an de Decembro okazos denove nia Zamenhof-Festo.

La evento okazos kiel kutime en la Pola Instituto, Am Gestade 7, 1010 Wien.

Ni ĝojas pri via alveno kaj pri interesaj rakontoj el via verda mondo.

Detaloj: <https://eventaservo.org/e/a71b1b>

(2021-09-13 Franziska Dodik)


## Hinweis: Bankverbindung AEF

Der Österreichische Esperanto-Verband (AEF) hat ein neues Bankkonto:

Österreichischer Esperanto-Verband  
IBAN AT612011184452740800  
BIC GIBAATWWXXX

Das alte Konto bei der Easy-Bank läuft Anfang nächsten Jahres aus.

(2021-09-15 Alfred Heiligenbrunner)



## Jarfina renkontiĝo Luminesk' ĉi-jare en Münster

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio.

Ĝi nun okazos la sepan fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj", private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon – lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj.

En la historigrava urbo de la tielnomata "vestfalia paco" la tridekjara milito estis finita en la jaro 1648. Tiutempe la riĉaj komercaj familioj influis la bildon de la urbo, hodiaŭ ankoraŭ videbla per la multaj pompaj domoj ĉirkaŭ la merkata placo Prinzipalmarkt. En la nuna jarcento Münster estas konata pro sia universitato kaj la universitata hospitalo. La miloj da studentoj pozitive influas la urbocentron.

La loko estas atingebla per aŭtoŝoseo kaj pli favore per la IC de Kolonjo aŭ Hamburgo. Ĝi situas en bela pejzaĝo de la ebena Münsterland. La arkoiro ĉe la merkato Prinzipalmarkt estas vidinda, same la katedralo Dom kaj la urbodomo, kie la "vestfalia paco" estis sigelita. La multaj studentoj ankaŭ troviĝas sur la vojo de la urba muro, kiu konektas la diversajn urbopartojn ringforme, kompreneble per biciklo, en loka dialekto "leze".

Pliaj informoj troviĝos en la retpaĝo [www.luminesk.de](http://www.luminesk.de)



## Mit Erasmus+ zum Esperanto-Kongress nach Italien

Viele Wege führen zu Esperanto. Wir beide sind durch einen Zufall dazu gekommen und auch durch die Pandemie, die uns (wenn auch unfreiwillig) mehr freie Zeit eingebracht hat.

Es war eine kleine Anzeige des Deutschen Esperanto-Bundes in der Freiwilligenbörse von berlin.de, die unsere Aufmerksamkeit erweckte. Der Esperanto-Bund suchte Ehrenamtliche, um beim Katalogisieren von Büchern, die der Staatsbibliothek zu Berlin angeboten werden sollten, zu helfen. Also meldeten wir uns, und mit der neuen Aufgabe kam auch das Interesse an der Sprache. Und es ist ja bekannt, dass da wo Interesse ist, jede Gelegenheit ergriffen wird, diesem Interesse auch nachzugehen. Wir verdanken es Barbara Brandenburg, dass wir uns in dem Online-Esperanto-Kurs von Rudolf Fischer fanden und, ein wenig später, schließlich dann auch auf dem italienischen Esperanto-Kongress in Assisi.

Diese lehrreiche und wunderbare Reise wurde mit Geldern aus dem Erasmus-Programm der EU finanziert. Anträge wurden ausgefüllt und genehmigt, Gelder überwiesen und unsere Teilnahme angemeldet. Am 20. August 2021 war es dann so weit: die internationale Welt des Esperanto öffnete für uns die Tür.

Dank hervorragender Organisation und dem vielfältigen Programm hatten wir eine Woche lang Gelegenheit, den Kongress zu genießen: an einem Sprachkurs teilzunehmen, Konzerte und Vorträge zu besuchen und vor allem viele interessante und nette Menschen kennen zu lernen. Besonders schön waren die zahlreichen Exkursionen durch das atemberaubende Umbrien. Natürlich alles in Esperanto





- der Sprache, die uns Teilnehmer aus allen Ecken der Welt zusammengebracht hat.

Und so, nach dieser intensiven und erlebnisreichen Woche, ist es nicht verwunderlich, dass die Welt des Esperanto uns völlig in ihren Bann gezogen hat.

Mit einem Teilnahmefragebogen von Erasmus und der folgenden Mail an Barbara endet schließlich unser kleines Abenteuer, das für uns beide definitiv zum Höhepunkt dieses Jahres geworden ist:

Kara Barbara,

*tre varman saluton por vi el Asizo. Hodiaŭ estas la lasta tago de la kongreso, kaj ni ambaŭ volas danki vin pro la bonega tempo en Italujo!*

*Dum ĉi tiu semajno ni lernis multon, vidis multon kaj renkontis multajn interesajn homojn.*

Varmajn salutojn

Olga Khomchenko kaj Irina Köhler



## Unuiĝintoj por Paco

La 21-an de septembro 2021 (Internacia Tago de Paco) kvin invititaj esperantistoj partoprenis en Internacia Pacforumo "Unuiĝintoj por Paco" en la hotelo Devín, en la slovaka ĉefurbo Bratislavo.

La forumo havas en sia statuto "subteni Esperanton kiel internacian lingvon de paco". Stano Marček kaj Petro Baláž estis akceptitaj en la estraron kaj estis invititaj al kunlaboro.

La forumon enkondukis la iama prezidento de Slovakio Ivan Gašparovič, post kio sekvis alparoloj de invititaj gastoj kaj reprezentantoj de politikaj partioj.

